

BELGA ESPERANTOFEDERACIO



Sonorilo

56a jaro n° 2
Marto - Aprilo 1964



- ★ POR VIAJ eksterlandaj transpagoj
- ★ POR ŝanĝoj en la plej alta kurzo
- ★ POR VOJAĜdevizoj

Bank van Roeselare & Westvlaanderen
Sidejo : ROESELARE
Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI
VIANDAĴEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAĴEJO... VI
AĈETAS ĈE

STROVI

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj :
GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono : pogranda komerco 34559
detala * 33408

STROVI estas unuaranga!

Sonorilo


oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KLARADREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE
POUPEYE CHARLES

KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ :

DR. POL DENOËL
BRUNO DENOËL
ISERENTANT ROGER
DE CUYPER GEORGES
DE MARRÉ LUC

ADMINISTRADO : TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO

DEBRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

ĜENERALA PREZIDANTO

JAUMOTTE MAURICE

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDELEENASTRAAT 29 KORTRIJK
DRÔ DENOËL POL, 10 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

ROOSE FERNAND

VICPREZIDANTINO ŝAKESTRINO POR KONGRESOJ

PLYSON J. 23, PLACÉ E. FLAGÉY, BRUSĜLO 5 P.K. 236804

VICPREZIDANTO ŝAKESTRO PRI TEĜNIKAJ RIMEDOJ

VERSTRAËTEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

ĜENERALA SEKRETARIO

DE MARRÉ LUC, GROENENDAALIAAN 232, ANTWERPEN TEL. (03) 411912

SEKRETARIO POR LA FLANDRALINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRIJS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINO

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

poŝtkonto de B.E.F. : 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2
P.K. 905125

ANTAUKONGRESO BRUSELO

La Oficiala Brusela Antaŭkongreso intencas oferi al la partoprenantoj de la 49-a U.K. en Hago la okazon pasigi kelkajn tagojn en feria, nestreĉa, neamasa esperantista atmosfero, en la kadro de neformala, interesa programo. La manifestacio deziras, krome, montri al la vizitantoj nekonatajn aspektojn de la belga ŝefurbo.

ADRESO : La korespondado por la Antaŭkongreso devas esti adresata al : Esperanto-Antaŭkongreso, 13 rue de la Reinette (Pijppelingstr.), Bruselo.

KOTIZO : La aliĝkotizo estas 100 b.fr. (2 dolaroj). Edzino kaj gejunuloj ĝis 25 jaroj pagas la duonon. La kotizo kovras la administrajn kaj organizaĵajn kostojn (korespondado, insigno, ktp) kaj rajtigas la partoprenon en akceptoj, sed ĝi ne inkluzivas manĝojn kaj ekskursojn.

PAGOJ : La kotizo kaj aliaj pagoj povas okazi laŭ jenaj vojoj :

- 1) Per Banko : al « Esperanto-Antaŭkongreso », S-ro H. Schumacher, Banque de Bruxelles, konto A/05-12909.
- 2) Per poŝtĉekkonto : al S-ro H. Schumacher, 90 rue Van den Bogaerde, Bruxelles - Brussel, konto 47156.

LOGADO : La Vojaĝagentejo Wirtz, kiu jam organizis la loĝadon de la 45-a U.K. en Bruselo en 1960, zorgos la ekzaktan plenumon de la loĝmendoj de la partoprenantoj. Estas antaŭviditaj komuna loĝejo kaj diversaj kategorioj de hoteloj. Detalaj informoj sekvas per aparta bulteno.

PROVIZORA PROGRAMO :

AKCEPTOJ :

- Akcepto de la kongresanaro kaj regalo ĉe la Teraso Martini, sur la 29-a etaĝo de nova nubskrapulo situanta en la centro de la urbo ;
- Akcepto de la kongresanaro kaj regalo en la Erasmo-domo, fare de S-ro J. Bracops, parlamentano kaj urbestro de Anderlecht (Bruselo).

VIZITOJ :

- Aŭtobusa vizito tra Bruselo.
 - Vizito al la Beginejo de Anderlecht.
 - Gvidata vizito al la mezepoka Abatejo de la Cambre.
 - Gvidata vizito tra la Nacia Muzeo de Belaj Artoj (salonoj pri la flandraj pentristoj).
 - Gvidata vizito tra la Nacia Muzeo de Naturaj Sciencoj.
- BANKEDO KUN EVENTUALA BALO.**


FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20



BELGA
ESPERANTO-FEDERACIO

45-a kongreso en LIEĜO (WÉGIMONT)

16-, 17- kaj 18-a DE MAJO 1964

Adreso por korespondado :
D-ro P. Denoël, 20 rue Victor Raskin, Lieĝo.

OKAZE DE LA LIEĜA KONGRESO...CHAUDFONTAINE

La superlativo estas ĝenerale uzata por turista propagando. Estas kvazaŭ ĉiuj libertempaj termalejoj, eĉ la plej modestaj, surmetas siajn dimanĉajn vestojn por prezenti sin al la granda publiko. « La Perlo de... », « La Reĝino de... ». Okazas eĉ ke pro tiu Moŝta nomo ili kadukaj aperas.

Chaudfontaine ŝajnas evitis tian tentemon al honora liriko. Chaudfontaine ne titoliĝas « Perlo » au « Reĝino », ĝi simple aspiras esti fidela al tiu saĝa regulo de la mezuro kiu kreas la harmonion de la belo kaj bono.

Je 8 kilometroj de Lieĝo, proksimume 1 horo trajne de Bruselo, Chaudfontaine kuŝas borde de la vojo kiu kondukas al Spa kaj Verviers, laŭlonge de la Vedra valo. Ĝi estas iel la majesta enirejo de la Ardena katedralo. Venante de Lieĝo oni surpriziĝas pro la luksa termala komplekso kiu maldekstre ornamas la vojflankon. Estas ĉi tie ke batas la koro de Chaudfontaine laŭritme de la pulsado de la akvo kiu bolante elspruĉas. Akvo varma, benefika, karesema.

Per siaj sanigaj termalakvoj, pompa kazino, luksaj hoteloj, sia arĝentosimila rivero, siaj pintegmentaj domoj, Chaudfontaine similas al pentraĵo de Fernand Léger.

Forlasante la centron de Chaudfontaine vi faros verdaĵan eltrovon promenante sur la serpentumaj vojetoj, kiuj grimpe tenas sin surflanke de la altaĵoj. Vi admiros mirindan regionon kiu laŭ popola tradicio baptiĝis laŭ ĉarma kaj imagoplana maniero. « Ninane » kun siaj malnovaj farmdomoj, « Ninane » kies nomo ĉarmas kiel pli frue lulkanto. La Aleo de la Soproj kaj la Fonto de la Amo, kiun generacioj pelgrime konsultis. La « Trou des Sotais », misteroplena kiel mezepoka legendo, la Ponto de la

Diablo kiu interligas du arbarkovritajn antaŭmontojn. La aero estas purega sur la montpintoj, ĝi abie kaj muske bonodoras. La admira rigardo perdiĝas sur unu de la plej variaj horizontoj de Belgujo, kiu kunigas la Mosan gracion kun la severa Ardena beleco. Ne hezitu antaŭ au post la kongreso, vizitu Chaudfontaine. Prenu vian tempon ĉar estas grave promeni al la fonto de Chaudfontaine.

Delegito de UEA - Lieĝo
André Coppé,

Alvoko

Ne lasu elĉerpi la eblecon, tranokti en la kastelo mem. La nombro de la ĉambroj estas limigita. Tuj mendu, pagu vian tranoktejon. Vidu la informojn en la antaŭa « Sonorilo » aŭ skribu al la kongresa adreso: D-ro P. DENOEL, 20 rue Victor Raskin, Lieĝo.

Postkongreso de la Fervoja Kongreso

La kongreso de la « Internacia Fervoja Esperantista Federacio » okazos en Bruselo dum la semajno antaŭ nia Belga Kongreso. Ĉar ĝi finiĝas la vendredon, la malfermo de nia 46-a ĝuste la sekvontan tagon, estas tiam favora okazo por multaj fervojistoj fini sian restadon en Belgujo inter niaj kongresanoj.

Informado de la L.K.K.

La L.K.K. por la 46-a Belga Kongreso informis nin ke la prepara laboro normale kaj regule disvolviĝas.

Je la 16-a de Januaro, do 4 monatojn antaŭ la malfermo de la Kongreso, la nombro de la pagitaj aliĝoj estas kontentiga: 85 el ĉiuj belgaj grupoj (kaj unu el Parizo!).

Estas do tempo ke la aliaj senprokraste aliĝu, se ili deziras havi ŝancon tranokti en la kongresejo mem.

Efika propagando

Ne nur por nia distro kaj amuzo devas utili niaj kongresoj, ankaŭ por la ekstera propagando. Ni provis esti helpataj de la belga poŝta administracio: dum 4 monatoj la poŝtoficejo de la lieĝa ĉefstacio (do la dua por Lieĝo) ŝtampas la poŝtaĵojn per kromŝtampilo kun reklama teksto favora al nia 46-a Belga Esperanto-Kongreso. Do ĉiu kvara letero aŭ poŝtaĵo kiu estos sendita per tiu poŝtoficejo portos la reklamilon. Miloj kaj miloj da leteroj al la ekster- aŭ enlando estos ĉiutage reklamilo por nia afero.

Amuza Vespero

La sabata vespero estas rezervita al distrado kaj amuzado de la kongresanoj. Bonvolemluloj el aliaj grupoj jam anoncis sin. La lieĝa grupo preparas teatraĵon. Dum tiu vespero estos ankaŭ projekciataj du kolorfilmoj: unu malgranda pri la Beneluksa Kongreso en Antverpeno kaj la alia (pli longa) kun la titolo « Lieĝo-Sofia-Lieĝo », kiu prezentos vojaĝon kaj restadon de Esperantistoj okaze de la Universala Kongreso en Sofia.

La Kongresejo

Kiel anoncote nia kongreso disvolviĝos inter la muroj de la modernigita Kastelo de Wégimont.

Tiu kastelo situas ĉefe sur la teritorio de Soumagne, ĝia granda parko etendiĝas sur alia komunumo, Aveneux. Soumagne kaj Aveneux estas en la « Herva Lando », tute herbeja, je maksimuma alteco de 300 metroj. La pejzaĝo prezentas fosaĵojn, vastajn amfiteatrojn akvigatajn de riveretoj, kies nomoj estas nekonataj aŭ neekzistantaj.

Fumoj kaj bruegoj el industriaj regionoj ne alflugas ĝis ĉi-tie. Regas escepta kvieteco, nur interrompita de la turistoj, kiuj dum dimanĉoj kaj festotagoj vizitas la kastelon kaj ĝiajn eksternajn dependaĵojn (la parko, la naĝejo, la lageto, la infanaj ludaparatoj). Tiu publiko certe interesiĝos al nia esperantista vivo, ĉar ni provos altiri ilin al speciala lokalo-ekspozicio.

La Kastelo

La kastelo de Wégimont formas trilateran tuton el konstruaĵoj. La ĉefa ekstera fasado estas superigita de alta sonorilturo, karakterizo de Lieĝa Renesanco. La honorkorto donas impreson de riĉeco, grandeco kaj potenco. Ĝi tamen ricevis pli modernan ornamaĵon. Sub la terasoj, en la subloĝejo, oni komforte instalas la kuirejon, sed estis konservitaj multaj restaĵoj de la malnova aspekto.

Interne la granda halo en klasika stilo servas kiel manĝoĉambrego; ĝi liberlasas majestan ŝtuparon. Maldekstre, senŝanĝa troviĝas la kapelo. Je la alia ekstremaĵo de la halo estas legosalono en rimarkinda stilo « Louis-Philippe », kun pentrita plafono kaj pavimo de Delft.

La miksado de stiloj respegulas la historion de la kastelo. Oni konas plurajn epizodojn. Supre de la enirpordego oni povas legi daton: 1614. La kastelo estis parte detruita en 1636 okaze de fama milito inter la nobeluloj kaj la metianoj. Lokita sur krucovojo inter potencaj regnoj, ĉe la « vojo de la invadoj », ĝi multe suferis dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj. Ĝi fakte estis rekonstruita en 1719, kiun daton oni povas legi antaŭ la perono de la honorkorto.

Pluraj familioj sinsekvis en Wégimont, nome la d'Aspremont-Lynden, Karlo d'Oultremont, ktp. La princepiskopo Johano-Teodoro de Bavarujo restadis tie en 1744 kaj 1756.

En 1919 komunumo Soumagne serĉis ejon por instali maljunulan hejmon. Markizo d'Oncieu de Chaffardon, makleristo de familio Oultremont, proponis la kastelon de Wégimont, sed tio ne efektiviĝis. La 5-an de Majo 1937, la lieĝa provinca konsilantaro unuanime voĉdonis decidon akiri la kastelon por publika uzado, unuavice por libertempa ripozejo de pensiuloj.

BELGA ESPERANTISTO JUNULARA ASOCIO

B. E. J. A. 1963

Kvankam BEJA fondiĝis la 28-an de okt. '62 je iniciato de S-ro Wim De Smet, oni povas diri ke ĝi nur praktike ekfunkciis en 1963. Nia laboro estis grandparte organiza: statutoj, rilatoj kun BEF, kompilo de membrolistoj, Fiksado de respondecoj de ĉiu estrarano k.t.p.

Tio tamen ne estis ĉio!

- Beja dissendis bultenojn al membroj kaj « interesigantoj ».
- En decembro aperis nia unua nacilingva monata informilo.
- Dum la Jubilea Beneluxa Kongreso en Antwerpen okazis unua aparta kunveno de kelkaj BEJA-anoj.
- Dum semajnfino de la 12-a kaj 13-a de oktobro okazis piedekskurso ekde Bruselo.
- En la Universitato de Liege fondiĝis nova klubo « LEGU ».
- Ekzistas ankaŭ junularaj kernoj en Antwerpen, Leuven kaj Aalst.
- 4 BEJA-anoj kune vojaĝis al la 7-a Internacia Seminario en München.
- Kontaktoj daŭris kun la B.V.S.E. (Beweging voor de Verenigde Staten van Europa) kaj la V.J.H. (Vlaamse Jeugdherberg-centrale) kiuj nun propagandas Esperanton.
- IFEF, SEL kaj kelkaj SAT-anoj ankaŭ apogas nian asocion.

B. E. J. A. 1964

Nia agado en 1964 estos triobla:

1) Pli vasta informado:

Niaj nacilingvaj informiloj estas destinataj precipe al ne-esperantistoj. Ili nur povas efiki se ili estos dissendataj en granda kvanto.

a) Vi povas igi viajn konatulojn simpatiantoj je 10 F. La koncernaj personoj ricevos dum la tuta jaro ĉiumonate informojn pri la Esp.-movado en Belgujo kaj en la mondo. Adresojn sendu al Roger Van Humbeeck - Dambruggestr., 296 - Anwerpen bv. menci la gepatran lingvon). Mono devas alveni ĉe la kasistino Ingrid Maes - Lange Elzenstraat, 38 - Antwerpen (Pĉk. 15.06.57)

Atentu: tiuj « simpatiantoj » kompreneble ne estas membroj.

b) Ni cetere ŝatus sendi niajn informilojn senpage al multaj gejunuloj kaj ne-esperantistaj organizaĵoj. Tio povos okazi se kelkaj homoj ĝiros libervole sumon al nia kasistino. Antaŭan dankon!

2) Pliprofundigo de Esperanto-kono:

Kiu kuniros al Wégimont? Ne forgesu rapide sendi la aliĝilon, se ankoraŭ ne okazis.

3) Membrigo:

Tie, kie ne ekzistas junulara grupo, la asociaj membroj daŭre povas pagi la kotizon al la grupa sekretario aŭ kasisto, kiu transsendos la kotizon al F-ino Terryn.

Ni petas kunlaboron de ĉiuj kasistoj per havigi al nia ĝenerala sekretario la liston de ĉiuj membroj malpli ol 25-jaraj (se eblas kun naskiĝdato).

Ivo DURWAEL



RABATO POR ESPERANTISTOJ

Sur neutrala

Lingva fundamento

La belgaj gereĝoj vizitis la malproksiman orienton. La vojaĝo okazis per belga aviadilo kies personaro konsistis parte el nederlandlingvaj Flandroj kaj parte el franclingvaj Valonoj. Por eviti ĉian lingvan incidenton nur la uzo de la angla lingvo estis al ili permesata kaj ankaŭ la gereĝoj en la aviadilo nur uzis tiun lingvon. Sur flugiloj de facila vento kaj sur neŭtrala lingva fundamento okazis la flugo al la oriento.

Lingvaj problemoj denove instigis al trovo de solvo, sed solvo kripla laŭ nia esperantista konvinko!

ECO

NOTO DE LA REDAKCIO: Ĉu la elekto de la Angla lingvo estas vere kaj tute neŭtrala?

Kaj kion diri pri la fakto ke gereĝoj — kaŭe de prilingvaj disputoj — ne rajtas uzi unu de siaj lingvoj!!

Sed okazintajo ankoraŭ multe pli frapa, kaj tute ne pravigebla estas tiu de la alveno de la Nederlanda princino Irena kun sia fianĉo sur Nederland teritoria flughaveno. Sian unuan deklaron destinitan al sia Nederlanda popolo ŝi faris tute en la fremda Angla lingvo!!

PETU PROSPEKTON PRI



ĈE I.T.C. - GEB. 114
SCHIPHOL NEDERLAND

GEVAERT-FOTO-KONKURSO okaze de la 49a Universala Kongreso kaj la 20a Internacia Junulara Kongreso ebligas al ĉiu foto-amatoro gajni grandiozajn premiojn. Li aŭ ŝi simple produktu la plej bonan foton pri la temo el la Taglibro de Anne Frank :

« Frenezĉe mi amas la naturon, ĉu nur pro tio, ke dum longa tempo mi ne povis elŝovi la nazon eksteren ? »

Kompletan regularon vi trovos sur aparta folio en la Esperanto-gazetaro, aŭ vi ĝin petu ĉe la 49a U.K. aŭ 20a I.J.K.

La ĉefa Gevaert-premio estas belega medalo kaj 400 ned. guld.; krome Gevaert disponigas por la plej sukcesinta juna fotografo (sub 26 jara) medalon kaj 200 guldenojn!

Butikistoj, fotovendejoj kaj aliaj esperantistoj kiuj regule kontaktas la publikon bonvolu mendi kvanton da folioj por disdonigo al ne-esperantistaj klientoj kaj konatoj. Ankaŭ tiuj partoprenu, kaj vole-nevole interkonatiĝu kun Esperanto!

Sekcioj. Dum la Kongreso estos du laboraj sekcioj, kies temoj estos : a) La eduka valoro de la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj ; b) Aplikado de modernaj metodoj en la informado pri Esperanto.

Aliĝado. Ĝis la 29-a de januaro aliĝis entute 1559 kongresanoj el 37 landoj (pasintjare 1480 el 35 landoj).

INTERNACIA RENKONTIGO EN CALAIS

La nova klubo de CALAIS (Francujo) organizos « markolan » kongreson, kiu kunigos francajn, belgajn, britajn kaj alilandajn geesperantistojn de la 28 ĝis la 30a de marto. Eblos unutaga partopreno. **INFORMEJO :** Esperanto - 178 Chemin Castre, Calais (P. de C.), Francujo.

EL POPOLA CINIO estas senpage ricevebla dum 1964 por ĉiuj Esperantaj grupoj, kiuj sciiĝas al ni sian deziron kun indiko de (1) nomo kaj adreso de la grupo (preslittere) ; (2) nombro de la membroj ; (3) nomo kaj adreso de la prezidanto aŭ sekretario ; (4) se estas biblioteko, ankaŭ nomo kaj adreso de la bibliotekisto. La sola devo estas elmontri la ricevitajn gazetojn dum la klubo kunveno aŭ almaniere al la membroj. Skribu tuj al Cina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 77, Pekino, Cinlo.

POR LA PASKA LIBERTEMPO.

ALVENTAGO : la 1-an de Aprilo ; **FORIRTAGO :** la 8-an de Aprilo.
KULTURA SEMAJNO gvidata de Sro LLECH-WALTER, prezidanto de U.E.F. kun partopreno de elstaraj prelegistoj.
La kastelo estos malfermita la 28-an de Marto.

DIFINOJ :

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

Horizontale :

- 1) Tiuj de iu Itala urbo estas famaj.
- 2) Nomo de vulkano - dio de la vento.
- 3) malfleksebla - duon' de paro.
- 4) regiono en kiu armeo translokiĝas.
- 5) io malsama - neologismo por kuraĝi.
- 6) anagramo de « aŭdebla aervibrad' » - turka ĉap' - neoficiala sufikso.
- 7) slava antaŭnomo - neoficiala prefikso.
- 8) pronomo - duona ovaĵo.
- 9) ne troa.
- 10) klaso de ringvermoj.

Vertikale :

- 1) Dirmaniero propra al iu popolo.
- 2) Studo pri malsanoj.
- 3) nedanĝera rampulo - prepozicio.
- 4) turka greno - returnire.
- 5) sekve - prefikso.
- 6) val' en Germanujo kie oni trovis kranion (fonetike sen h).
- 7) nomo de litero - kiel izola loko.
- 8) grasaj - fortranĉ'.
- 9) kontraŭsepsa substanc'
- 10) apartigitaj.

N.B. 1) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difino, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finaĵo.
2) La solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos elotata.
3) Sendu NEPRE vian solvon al : Ch. Poupeye, Elf Julistraat, 11, Bruĝo, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.

SOLVO DE LA PROBLEMO N° 7

Inter la diversaj ensendadoj, naŭ seneraraj de : Frato Arni Decorte, Blesbeek ; F-ino Elv. De Coene, Eekeren ; S-ino J. De Hondt, Antwerpeno ; S-ino Plyson, Bruselo ; Sro Lemme, Lieĝo ; Sro J.R. Van Eynde, Wilrijk ; Sro Eneman, Assebroek ; Sro Iserentant kaj F-ino Willems, Bruĝo.
Lotumado, dum kunveno BGE 11/2/64 aljuĝis la libropremion al F-ino Elv. DE COENE.
Solve al la problemo N° 5, ensendita de Do-cento Viktor Gruško el Rostov-Don (Sovetio) alvenis multe tro malfrue, sed, kiel rekompenco al tiu escepte malproksima solvinto, libropremio estis sendata al li.

K R E S T O M A T I
R A N - I L U M I N
I B S E N - E B - T
S A P - E N L A S E
T R I B - - I S - R
A B R I K O T A - N
N O - B A L A D - A
A - U L N E - O P C
R E - I O - K R E I
O K C E N T J A R A



RECENZZOJ



LA NAŬZO. Romano de Jean-Paul SARTRE. El la franca tradukis Roger BERNARD. Eldonis Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1963. Scio Oriento-Okcidento, n-ro 3, 222 p. 21 × 15.

Prezo bind.: 14,10 gld., broŝ.: 11,70 gld.

En la lastaj jaroj la nomo de J.-P. Sartre daŭre sin trudis al la atento kiel tiu de famiganta aŭtoro kaj ĉefa reprezentanto de la Ekzistadisma Skolo. Sed kredeble ne tre oftaj estas kiuj koniĝis kun liaj verkoj onidire tro filozofiaj por komuna konsumado. Eble ankaŭ pro tio multaj en niaj vicoj bonvenigis la esperantigon de «La Nausée» kiu iugrade ebligis al ili renkontiĝon kun, kaj esploron de, nuntempa idetendenco diverssence prijuĝata.

La libro nomiĝas romano sur la titoloĝaĵo kaj, laŭ la formo almenaŭ, ĝi efektive ŝajnas tia. Ĝi estas ja la taglibro en kiun iu Antoine Roquentin notis siajn sportojn, siajn travivaĵojn en la lukto kontraŭ la premegega problemo de la ekzistado. Sed enhave ĝi ne estas romano kiel alia. Oni vane serĉus streĉan intrigon aŭ esploron de intimaj situacioj komune homaj.

Mallonge skizita, la enhavo povus prezentiĝi tiel. En 1932 A. Roquentin restadas en Bouville, granda franca havenurbo, en kies biblioteko li povas traesplori riĉan dokumentaron pri iu historia figuro kies biografion li estas verkanta. La 30-jara historiisto loĝas en hotelĉambro: sola li vivas, apenaŭ al iu parolas, des pli ofte enpensigas. En si, ĉirkaŭ si, li tiel ekrimarkas signojn kiuj lin timigas, kiuj anoncas renversigon en lia vivo, kiuj devigos lin rezigni pri sia historia libro. Li nepre volas klare vidi en si, tial li notas siajn konstatojn kaj analizojn en sian taglibron. Se hazarde li palpas ŝtoneton ĉe la bordo de la maro, aŭ premas klinkon de pordo, aŭ eĉ nur rigardas bierglason: jen timo ekkaptas lin, vomemon li sentas, la Naŭzo lin tenas. Estas netolereble al li, ke objektoj tuŝas lin. Ne scipene ni povas ĝisfine sekvi R. sur tiu tereno.

Sed ne nur pri aĵoj li cerbumas, ankaŭ la homojn en Bouville li ne povas pretervidi. Kelkajn el liaj plej ĝueblaj paĝoj ni trovas, kiam li ironiete prezentas la straton Tournebride (p. 62) je dimanĉa mateno, «la rendezuejon de la elegantuloj kaj eminentuloj» en ilia pompa etburgeco, aŭ kiam pli sarkasme li gvidas nin tra la urba muzeo kaj revuas antaŭ ni la lokajn famulojn (107). Dume li jam malkovris, ke «la pasinteco ne ekzistas». Konsekvence li rezignas verki libron pri figuro el neekzistanta pasinteco.

Sed maltrankvilo, teruro, paniko daŭre envolvas lin, vomento lin sufokas, kaj sian penigan pensadon li premas en nekoherajn frazpecojn de kvazaŭa deliro (126-130). Ĉu do ni atingis la kulminan punkton de la krizo? Estu kiel ajn: la pensado pli kaj pli kristaliĝas je formullformaj principoj: «estas nenia pravigo por ekzisti» (141); «mi ekzistas, la mondo ekzistas, — kaj mi scias, ke la mondo ekzistas» (153). Jen ŝajne la plej grava malkovro: «Kaj subite... la vualo disŝiriĝas, mi komprenis, mi vidis... kion signifas ekzisti» (158): «...la ekzistado estas la pasto mem de la aĵoj...» (159). Atentinde ankaŭ, ke la

ekzistado estas kontingenta (163): «Ĉiu ekzistanto naskiĝas sen kialo, pludaŭras pro maŭfarto kaj mortas pro hazardo» (166).

Jen kelkaj el la konkludoj al kiu obseda pensado kondukis R., kaj supozeble ankaŭ la samaĝan J.-P. Sartre, la «eldoninton» de la taglibro, kiu sin konvencie ŝovis malantaŭ ties «verkinton».

Certe, la filozofia teorio ne ege klaras, kaj necesos plua studado por kompreni. Sed estas jam aprezinda kontentiĝo, ke por ni levigis pinto de la vualo kaŝanta idearon pri kiu ni ĉie aŭdas kaj kies ekziston ni ne povas ignori. Aliflanke, multaj estas la paĝoj plaĉaj jam el nura literatura vidpunkto. La plej ordinarajn objektojn aŭ okazaĵojn la verkinto sukcesas tiel malkovre sugesti, ke legado fariĝas plezuro. Ne nur kiam li laŭ la maniero de la konsekvenca realismo priskribas aŭ rakontas plej eble simple kaj registre objekte, kun apenaŭ iu persona reago (ekz. la kartludo p. 36), sed ankaŭ kiam preterpase li ekspresionisme fasonas la mondon eksteran. Pli efike ol la Ekzistado la superrealismaj sonĝoj kaj vizioj (81; 99; 195) elvokas ĉe ni la Naŭzon. Kvankam artisme indaj je la peniko de Dali, ili povus ŝoki neavertitan leganton. Cetere, la libro en ĝia tuteco sin turnas al matura spirito.

La tradukinto nin regalis per flue legebla Esperanto kaj meritas ĉiun laŭdon. Duo da esprimoj tamen ŝajnas tro francaj por esti internacie travideblaj: «akordiĝi kiel foirejaj friponoj» (80/112); «lupopaŝe» (199/23). Dum «foraperi» (97/29) kaj «malvenki batalon» (183/31) rezultas el misa miksado. «Vojaĝisto» (21/33) nomiĝas jen «vojaĝkomercisto» (17/2), jen «komercvojaĝisto» (132/30). Kial «Komunista Ribelejo en 1871» (118/4), sed «Commune-ribelinto» (137/1)? Anstataŭ «depost» oni en pluraj lokoj pli ĝuste komprenu «de antaŭ» (106/35); dum en «ekde de tiu tago» (177/36) tiu «de» senrajte enŝteligis. Pro ĝia ne komunuza signifo sur 44/36 (kaj aliloke) oni ne tuj rekonas «finfine» en la fuŝita «Minfine, ŝi havase ŝancon». Ankaŭ la ĝena «asaltite» (31/23) (legu: «al-») postvivis la viglan ĉasadon al preseraroj. Kaj preterpase oni miras, ke preseraroj pli volonte floras kaj prosperas en Esperanto-publikaĵoj ol en naciolingvaj. Sed oni devas allasi ke tipografie la presisto bone zorgis la fortekie broŝuritan libron sub plaĉa kovrilo.

«La Naŭzo» envicigas kiel la unua okcidenta verko en la serio «Oriento-Okcidento». Oni povus pridubi, ĉu ĝi tiel okupas sian ĝustan lokon kaj favore kontribuos al la celita «reciproka konatiĝo kaj kompreno», impresante kvazaŭ la koncernaj vivkonceptoj estus tipe karakterizaj por la okcidenta kulturo, kaj la tutunualoke konsiderendaj. Oni povus pridubi, eĉ se la nomoj de J.-P. Sartre kaj de Ekzistadismo estas vaste konataj.

Dr. F. COUWENBERG.
12/12/1963

Jean PIRARD: «Le Voyage de Fred Mosan». Editions Biblio à Liège. 216 paĝoj. Prezo 84 belg. Fr.

Tiu Franclingva libro estas destinita por gejunuloj 12-16jaraĝaj. La romano estas tre flue skribita kaj katenas la atenton. Fred Mosan estas juna Valono kiu planas fari unujaran rondvojaĝon per biciklo. Jam en la tuja komenco li estas implikita en la komplikaj de Amerikanaj turistoj. Pro la fakto ke la juna Amerikanino estas esperantisto, kiel li, li speciale interesiĝas pri ŝia sorto. Tio kondukas lin al Ameriko mem! Tie li havos la helpon de nigrulo, ankaŭ esperantisto, kaj li malkovros ĉe si detektivajn talentojn! Kaj ankaŭ bonega komercisto li estos! Jen jam ĉio necesa por aranĝi streĉan romanon. Ni ne malkovru la reston. Vi mem legu. La libro bone montras la grandan utilon kaj belan rolon de Esperanto. Tamen, feliĉo, ĝi ne volas tion trudi kaj pravi sur ĉiu paĝo ĝis enuigo. Mi aldonu ankoraŭ ke ankaŭ multaj plenkreskuloj kun piezuro legos tiun plaĉaspektan libron. Ni kore gratulas kaj dankas J. Pirard kiu estas esperantisto, kaj kiu laŭ plej bona maniero propagandis tiel por Esperanto. Li estas membro de nia Lieĝa esperantista sekcio.

F. R.

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo“ (Sro Iserentant R.)
Kerklaan 61 Brugge, P.K. 152140.

Nekrologo

S-ino Volders-Van Der Mast

16.11.1963

La 16-an de novembro 1963 forlasis nin por ĉiam Samideanino Maria van der Mast, edzino de Samideano F. Volders.

Naskita en 1907 en Wilrijk apud Antverpeno ŝi lernis la internacian lingvon kaj aliĝis nian movadon jam en la jaro 1925. Tiam ŝi aktivis en la « Por-Esperanta Propaganda Komitato » (A.P.P.K.) kaj baldaŭ, en 1926, kunfondis « La Rekta-n Vojo-n » kies aktiva sekretariino ŝi restis dum jaroj.

Post la malapero de tiu esperantista grupo en 1933 ŝi aliĝis la « Flandreman Grupo-n Esperantista-n » kaj en ĝi aktivis ĝis la eksplodo de la mondmilito.

Ŝi ĉeestis la internacian kongreson en Antverpeno en 1928 dum kiu ŝi akiris la esperantistan diplomon kaj ankaŭ partoprenis senescepte ĉiujn kongresojn de Flandra Ligo Esperantista. Ne nur partoprenis, sed kunlaboris al ili diversmaniere, ankaŭ kiel amatora aktorino.

Post la milito ŝi edziniĝis al Samideano F. Volders kaj tiun esperantistan paron oni de tiam senmanke renkontas okaze de ĉiuj Esperanto-eventoj: lokaj, landaj kaj internaciaj. Ilia domo estis malgranda Esperantujo kaj la reto de iliaj Esperanto-amikoj tra la mondo estis granda.

Samideanino van der Mast firme kredis en nia Esperanto-idealo kaj ĉiam optimisme kondutis en tiu senco. Respekte kaj pie ŝi restos en nia memoro kaj ni kunsuferas kun la funebranta edzo, Samideano F. Volders, kaj kun ŝiaj ceteraj familianoj inter kiuj estas kelkaj esperantistoj.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »
Kunsidoj: ĉiuvendrede en « Witte Lecuw » Frankrijkŝteto, 4 je la 20.15a h.
Poŝtĉeknumero: 726.54.

Nekrologo

S-ino Vidvino Jozefina Fehr, la patrino de Ges-roj H. Boffejon, mortis en sia 80-a vivjaro post longa malsano. Al niaj geamikoj Boffejon kaj la familio ni esprimas nian profundan kunsenton pro la ĉagreniga perdo de ilia amata parenco.

La 18an de oktobro S-ro G. Maertens el Bruĝo speciale venis al Antverpeno por paroladi pri la « Karavano al la Suno », aŭtoĉarvojaĝo al la Universala Kongreso en Sofio. Per multaj diapozitivaj kaj sprita kaj amuza parolado li sin konigis kiel ideala organizanto ne nur de tia fora vojaĝo sed ankaŭ de agrabla, interesa vespero. Oni certe deziras lin revidi kaj reatidi kiel eble plej baldaŭ. La ĉeestantoj abunde kaj longe aplaŭdis lin.

La 25an S-ro Maur. Jaumotte parolas S-ro M. Jaumotte komentariis kaj klarigis samtempe. Estis honorigataj pro

dis pri « La 100-jara Jubileo de la Ruĝa Kruco ». Kiel vic-prezidanto de la provinco Antverpeno en tiu organizaĵo li skizis la ekeston kaj evoluon de tiu mondfama institucio kaj krome aldonis personajn spertojn kaj travivaĵojn dum la malfacilaj periodoj de la lasta mondmilito.

Pro la rago de ĉiuj sanktuloj ne okazis kunveno dum la 1-a de novembro.

Sabaton, la 2-an de novembro delegacio de la grupo partoprenis al la Ornitologia Kongreso en St.-Job-in-'t-Goor kie oni ĝuis belegan posttagmezon pro la ideala sunplena vetero kaj pro la afabla akcepto en la « Kristus Koning Instituut » fare de frato Leotardo De Ruyver. Vizito al la instituto, promenado tra la arbaro por viziti kolomb-bredejon, prezentado de Esperanto-filmoj agrablighis tiun kongresanton.

La 8an S-ro R. Van Eynde denove prezentis amuzajn dokumentajn filmojn en koloroj. Unu estis en Esp-o kun titolo « Malproksimaj Najbaroj ». Pri ĝia efektiva respondecis S-roj H. Vermuyten, Jozef Montmirail kaj J. Verstraeten.

S-ro Fr. Schellekens faris vojaĝon al Grekujo kaj faris multajn kolordiapozitivajn. Krom la ĝuado pri la belajoj de tiu lando kie iam staris « la lulilo de nia civilizacio », li ankaŭ rendevuis en Ateno kun S-ino E. Riadis (verdstelano) kaj S-ro E. Paesmans (alia verdstelano). Pri ĉio tio li raportis dum la 15a de novembro.

La 22an alia vojaĝantino, F-ino Els De Roover, en speciala atmosfero kaj laŭ tre sprita stilo, kaptis la plenan intereson de la publiko per parolado pri « Korsiko, Homaro kaj Montaro ». Ŝi vere meritis la dankvortojn de la Prez. M. Jaumotte kaj la aplaŭdon de la publiko.

La 29an S-roj F. Schellekens kaj J. Verstraeten komentariis 2 pentraĵojn la « Krucŝarĝo » de Jeroen Bosch kaj « Henriette kun la granda ĉapelo » de H. Evenepoel. Tuta serio da diapozitivaj, verkitaj de S-ro F. Schellekens, ankoraŭ pligrandigis la belan programon.

Por enkonduki la festan monaton de decembro, dum la 6a, S-ro R. Jacobs Prez. de la Brusela grupo, akompanata de 4 kungrupanoj, venis prezenti siajn diapozitivajn pri « Nia Vojaĝo al Andaluzio ». Lia parolado precipe substrekis la belajojn kaj artaĵojn de la regionoj kiujn li traveturis. Tradicia dancmuziko estis aŭdigata dum la lum-bildoj daŭre montris la ĉiaman sunan atmosferon kiu regas plej grandparte en tiu granda lando. S-ro Jacobs uzis simplajn kaj minimumajn vortojn por diri la maksimumon kaj povis akcepti longan aplaŭdon post sinceraj dankvortoj de S-ro M. Jaumotte.

La 13an estis EKI-Zamenhofa Vespero. Je tiu okazo, malgraŭ la neĝa vetero en Lieĝo, D-ro P. Denoël (alveninte vagonare al Antverpeno laŭ invito de EKI) unue prezentis sian filmon pri la instruado de Esperanto. Poste li elparolis la festan paroladon pri « Gojoj kaj Suferoj de Ludoviko Zamenhof », temo kiun li pritraktis laŭ tre originala maniero, deklamante parkere tutan poemon de Zamenhof (Mia Pensio) kaj montrante en ĝi veran reliefon de gojoj kaj ĉagrenoj de nia kara Majstro. Li tiel impresigis la publikon ke preskaŭ sankta silento regis en la salono por ke neniu vorto perdiĝu! Grandega, cetere plenmeritita, aplaŭdo esprimis la tutan admiron de la publiko. Dum la alia parto de la programo S-ro Wolfs alportis la amuzan detalon

per la deklamado de 3 poemoj de R. Schwartz. Kun multa sukceso S-ro C. Borremans pligrandigis ankoraŭ la agrablan sferon per komuna kantigado de diversaj plej konataj kantoj kaj S-ro M. Jaumotte, EKI-Prez., konkludis la tuton per trafaj vortoj. Pro la tago de la libro oni organizis belan libro-standon kiu altiris multajn membrojn. La monkollekto estis eksterordinara!

Dimanĉon, la 15an je la 15a h. en « Witte Lecuw » okazis la Kristnaska infanfesteto. Bela ornamita salono (al kiu F-ino Conny Schellekens multe helpis) — multaj infanoj — festa atmosfero! La Prez. S-ro M. Jaumotte bonhumore bonvenigis la infanojn kaj gepatrojn. Ges-roj H. De Roover, kunaj, mirinde prizorgis kaj prezentis manpupateatraĵojn ege ŝatatajn kaj aplaŭdatajn de la infanoj. Diversaj el ili dum la paŭzo kantis aŭ deklamis kaj ĉio estis konkludata ĉe tablo kun kukoj kaj ĉokolada lakto. Finfine belaj donacoj estis disdonataj de « Paĉjo Kristnaska » (S-ro R. Balleux), — donacoj havigitaj de la grupo kaj flegitaj de S-inoj Marg. Jaumotte, Nath. Balleux kaj F-ino Hort. Brack.

La 20an S-ro L. De Marré prizorgis la Kristnaskan atmosferon laŭ iu nekutima maniero kaj laŭ tre persona stilo. La tradicia tombolo sub la kristnaskarbo alportis la festan atmosferon.

La 27an por konkludi la jarfinon disvolvigis la « Cirkaŭ la Fajro »-programo en tre varia stilo. Kunlaboris al ties sukceso: F-ino H. Hofkens kaj S-roj E. Claes, H. De Roover kaj Eug. Paesmans.

Por enkonduki la novan jaron 1964, la 3an de januaro, S-ro M. Jaumotte klarigis la novan programon « Libera Forumo ». Estas speco de debatvespero kies temo estis « La nova tunelo sub la Skeldo ». S-ro R. Van Eynde ĝin enkondukis kaj poste pluraj aliaj membroj aldonis sian opinion.

La ĝenerala jarkunsido disvolvigis dum la 10a. S-roj J. Verstraeten (sekretario) kaj R. Balleux (kasisto) prezentis siajn raportojn kiujn la Prez. 45-jara fidela membreco: S-inoj Marg. Jaumotte kaj Lucette Faes; pro 15-jara fidela membreco: S-ro R. Balleux, S-ino N. Balleux, S-ino L. Bernaerts, S-ro A. Debacker, S-ino G. Debaecker, F-ino L. De Winter, S-ino A. Govaerts, F-ino H. Heyens, F-ino G. Leibovitch, S-ro F. Schellekens, S-ro E. Segers,

S-ro A. Verduyssen kaj S-ro J. Verstraeten. Ricevis la bronzan medalon pro 10-jara fidela membreco: F-ino L. Verdyck, S-ro C. Tytgat, S-ino P. Tytgat, S-ino J. Peeters, F-ino C. Schellekens, F-ino M. Blondeau, F-ino A. Enzlin kaj S-ro E. Paesmans. Tradicie la malnova estraro daŭrigas sian taskon sur la nova jaro.

Dimanĉon, la 12an en la salonoj «Magnus» okazis la jara bankedo al kiu ± 40 personoj partoprenis inter kiuj 6 bruselanoj. Post la aperitivo oni pasidis al la belaspektaj tabloj kie la diversaj sinsekvaj pladoj ege bongustis. La Prez. S-ro M. Jaumotte entuziasme bonvenigis kaj alparolis la festigantojn instigante al streĉa laboro kaj konfesante denove sian firman kredon en la finfina sukceso de Esperanto. Al S-ro R. Balleux li transdonis bean libron pro lia 10-jara grupa kasis-teco. S-ro Luc De Marré (Vicprez., sprite bataleme sed tre afable dankis la Prezidanton ne nur por la entuziasma parolado sed ankaŭ pro lia tutjara sindonema gvidado de la grupo. S-ro R. Jacobs, Prez. de la Brusela grupo, alportis kaj transdonis la salutojn de siaj grupanoj. S-ro G. C. Fighiera, Prez. de la estonta Antaŭkongreso de Bruselo invitis la ĉeestantojn al tiu kongreso klarigante jam grandparte la programon. S-ro J. Verstraeten parolis nome de la «Ge-medalitoj» kaj dankis la grupon pro la honoro. Tiam denove S-ro Luc De Marré toastis je la honoro de la fraŭlinoj kaj sinjorinoj en amuza paroladeto plena je spritaj citaĵoj kaj simbole transdonis al S-ino Marg. Jaumotte belajn florojn. S-ro Vermuyten konkludis per kontribuo en poema stilo kiu vekis la gajecon de la ĉeestantaro.

La 17an S-ro Maur. Jaumotte prizorgis la «Rerigardon al la jaro 1963a» per abundaj tekstoj kaj lumbildoj dum F-ino A. Enzlin denove montris memverkitajn filmojn i.a. pri la U.K. en Sofio.

La 24an S-ro H. De Roover paroladis pri «Nia Vojaĝo al Arcachon» kiun li ilustris per dekoj da lumbildoj. Lia optimista, ŝercema kaj amuza stilo multe plaĉis al la aŭskultantoj kiuj ja varme aplaudis post la dankvortoj de la Prez.

Lundon, la 27an 21 gelnantoj en-skribigis por la nova elementa kurso kiu gvidos S-ro H. De Roover. S-ro M. Jaumotte faris la tradician enkonkludan paroladon.

La 31an diplomoj estis disdonataj al la gelnantoj de la lasta kurso. Sukcesis en la ekzameno: S-ro Guy Van de Castele, S-ro Louis Hollants, S-ino Celina Tanner, S-ino Elisa Mortelmans, F-ino Liliane Caron kaj S-ro Frank Jacobin. La Prez. S-ro M. Jaumotte faris la alparolon citante la diversajn metodojn por igi kaj resti bona esperantisto. S-ro L. Hollants, nome de la gelnantoj, iom idealista, laŭ rimarkinde bela maniero (pro enhavo kaj prezento) dankis la grupon kaj la profesoron S-ron L. De Marré. La ĉeestantoj longe aplaudis tiun unuan publikan alparolon de novulo. Per kompletigi tiun solenan programon estis prezentataj 3 dokumentaj kolorfilmoj esperante parolataj.

Nekrologo

Nia bona amiko S-ro A. Verduyssen estas grave trafita pro la morto de sia kara edzino post longa doloriga malsano. Al nia fidela membro kaj familio ni esprimas niajn profundajn kondolencajn kunsentojn.

BRUGO

BRUGA GRUPO ESPERANTISTA

Reĝa Societo (Poŝtĉekkonto N° 4835.33)

Por fini la jaron 1963an, multaj grupanoj, plus invititoj el la grupo Paco kaj Justeco, ĉeestis, la 17an de decembro, interesan paroladon de la grupa prezidanto, S-ro Ch. Poupeye, kun titolo «Impresoj pri Lugano kaj ĉirkaŭaĵoj». Belaj kolorlumbildoj donis ideon pri tiu vere «Paradiza» regiono. La 24an pro Kristnasko kaj la 31an pro Novjaro, ne okazis kunvenoj.

La jaro 1964a komenciĝis en la grupa vivo la 7an de januaro, kiam, post la kutima elementa leciono, la ĉeestantoj festis la Tri Reĝojn per bonega kuko, bakita kaj proponita de S-ino G. Poupeye. Enmetita fabo aljuĝis la reginecon al F-ino Is. Van Parvs kaj lotumado inter la viroj igis S-ron Jul. Ene-man reĝo de la vespero, kiu agrable daŭris sub ilia simpatia regado.

La 14an, F-ino Yvonne Poupeye, sekretariino de Belga Esp. Junulara Asocio, Flandra regiono, raportis detale pri la 7a Internacia Seminario de la Esp. Junularo kiun ŝi ĉeestis en Püllach apud München.

La 21an estis raportata pri la administrantara kunsido de BEF (Bruselo 18/1).

La ĝenerala jarkunsido okazis la 28an kun la kutimaj raportoj: morala, financa kaj pri la grupa vivo. La neceso plialtigi la membronombron estis ak-

zentata. La komitato estis grandparte reelektata, jene: Prez.: S-ro Ch. Poupeye; Vicprez.: S-ino S. Verbeke-Vandenberghes; Vicprez.-Kasisto: S-ro D. Demeulenaere; Sekr.: F-ino Is. Van Parvs; Helpa Sekr.-Bibliotekistino: F-ino M. Willems; Gekonsilantoj: F-ino Y. Van Parys, S-ro J. Ene-man (kursgvidanto) kaj F-ino Yvonne Poupeye (tiu lasta alelektata kiel delegitino por la junularo). Antaŭaj komitatoj, Sroj U. Soen kaj G. Meganck, pro manko de tempo, ne plu sin reprezentis. La komitato komprenante iliajn seriozajn motivojn, dankis ilin por faritaj servoj.

La 4an de februaro, S-ino Verbeke anstataŭis la prezidanton, iom malsanan, kaj direktis debaton pri la elementa kurso, sekvatan de Esp. kartuladon.

Pro Karnavalo la ordinara kunveno de la 11a estis anstataŭata per vespermanĝo en kampara restoracio en Oostkerke kaj posta partopreno en la karnavalaj amuzaĵoj en Damme.

Programo por Estontaj Kunvenoj

Kunveno ĉiumarde, je la 20a, en «Strijdershuis», Hallestraat N° 14, tel. N° 347.98. Dum la unua horo: leciono de la elementa kurso, ankaŭ rekomendata al pli malnovaj gemembroj; dum la dua horo:

MARTO: 3an: Parolata gazeto; 10an: Raportado pri la ĝenerala jarkunsido BEF (7/3); 17an: «Dudekdu stultaj tagoj» parolado de S-ro J. Ene-man; 24an: Kanta vespero; 31an: Konkurso pri eraraj desegnaĵoj.

APRILLO: 7an: Konkursludoj sub gvidado de S-ro D. Demeulenaere; 14an: Parolado de S-ino S. Verbeke-Vandenberghes pri «Naturŝtonoj» kun vizito de la ekspozicio «Artkameno»; 21an: Legado kaj tradukado; 28an: Amuza proceso.

BRUSELO

La 4an de Novembro 1963, la prezidanto de BEF, S-ro Jaumotte M. paroladis pri la temo «Vidi Neapolon kaj Morti». La preleganto rakontis dum 2 horoj kaj kvarono. Tiamaniere ni ĝuis belegan vojaĝon tra Italujo; la 11an ne okazis kunveno pro armistica festo; la 18an S-ro van der Stempel donis sian perfektigan kurson kaj la 25an sentoplanan historieton pri Kristnasko prelegis S-ro van der Stempel.

La 2an de Decembro 1964, okazis la disdono de la premioj pri la parolata ĵurnalo, S-ro Castel kaj S-ro Kanoniko Gillet estis la laŭreatoj; la 9an la ĝe-

grupanoj interbabiladis pri organizo de la Sankta Nikolao festo; la 16an nia eminenta verkisto S-ro Samyn, A. prelegis du memverkitajn verkojn «Vi estas kun ni ĉivespere» kaj «La Struktura Ekvilibro de la Internacia Lingvo»; la 23an S-ro Schellekens el Antverpeno aŭdigis plaĉegan muzikon kaj vidigis mirindajn bildojn pri du diversaj temoj: «Kristnaska Atmosfero» kaj «Gentaj Floralioj».

Brusela ĝenerala Jarkunsido: 27/1/64 KOMITATO

Prezidanto: Jacobs René
Viv-Prezidanto: Fighiera Gian Corlo
Sekretario: Nanquette Maurice
Kasisto: Oleffe Jean
Arkivistino: Staes Elly
EKI-Delegito: Castel Hector
Teknikisto: Piron Pierre

FAK-KOMITATO

Bibliotekistino: Kestens Mathilde
Protokolistino: Opsomer Simone
Help-Sekretario: Daems Maurice

GKOMISAROJ

Daems Marguerite
Schumacher Hubert

KARLOREGA GRUPO ESPERANTISTA

En novembro F-ino Orsolini parolis pri sia vojaĝo al Sofia Kongreso. S-ro Delforge diris kelkajn vortojn pri la intereso de nia lingvo Esperanto al la ne-esperantistoj, kiuj ĉeestis sufiĉe nombraj.

La projekcio de ĉirkaŭ 200 diapozitivaj, farita de nia sperta namura amiko Piron, la demandoj de la ĉeestantoj kaj la respondoj de la parolintino daŭrigis la vesperon dum 3 horoj.

En decembro ni havis la plezuron akcepti 2 afablajn ekstergrupajn samideanojn okaze de nia jara-Bankedo.

Nia sekretariino estis ankoraŭ sufiĉe vigla por frandi la bonajn manĝaĵojn, aranĝi amuzan loterion kaj danci ĝis la 3a matene, malgraŭ unu semajno de timo pro la danĝero sidi 13ope ĉe la tablo.

Okaze de nia LETERVESPERO; ni ricevis el 16 landoj 60 kartojn kaj leterojn al kiuj ni respondis dum la januaraĵ kunvenoj. Preskaŭ ĉiuj petis regulan korespondadon kiun kompreneble ni devis rifuzi.

Programo pri la Venontaj Kunvenoj

MARTO 5a: Rila Monaĥejo (kun 50 kolorbildo) de Fino Orsolini; 10a: Esperantista Gazeto - Surbendigo; 19a: Parolos nia Profesoro Delforge; 26a: Fino Orsolini prezentos siajn bildojn pri eksterlanda vojaĝo.

Kutime la kunvenoj okazas de la

19.30 ĝis la 21.30.

La jaudoj : Salono 4 de la Karloreĝa Urbdomo.

La mardoj : 66, Strato Vandervelde, Marchiennes.

LIEGA GRUPO ESPERANTISTA

Ciujāude, krom la 26an de decembro, la grupo kunvenis en sia ejo « Maison des Brasseurs », placo de Franca Respubliko, en Lieĝo. La ĝeneralaj kunsidoj, ĉu distraj ĉu edukaj, alternas kun la komitataj, laŭ la ritmo : unu-unu, escepte dum decembro, kiam estis ĉiuj ĝeneralaj. La programo estas ofte grava. Ni citu : Klarigo pri la homaj rajtoj — Pri la kromozomoj — Nia libertempo en Gresillon — Pri abelbredado — Kiamaniere lerni kanton — Cirkulado sur la vojoj. Ni akceptis Ges-ojn Jaumotte kiuj venis por viziti Wégimont kaj kiuj agrabligis la vesperon parolante kun projekcio, pri sia libertempa vojaĝo.

La dimanĉon 15an de decembro, ni festis la datrevenon de Zamenhof, en trinkejo « La Becasse » pro pli bona taŭgo de la salono. Bedaŭrinde, eble pro la aĉa vetero, nur 46 personoj partoprenis kaj tio kvankam la programo estis allogetema, ĝi eĉ estis perfekta laŭ la lotoj kiujn almenaŭ unu partopreninto ricevis.

Sabaton la 25an de januaro, sub patronado de « Supera Pedagogia Instituto de Lieĝo « Lieĝa Grupo Esperantista » kaj « Katolika Esperantista Asocio « Paco kaj Justeco » BRUGGE PK 9085.96 de Ada Van Wezel, Brugge

Depost apero de nia lasta kroniko, ni regule en la komenco de ĉiu monato fiksas la programon kaj ni ankaŭ tre akurate plenumis ĝin. La 14an de novembro ni preparolis en la grupo la novan libron de M. Boulton pri Dr. Zamenhof. (eldono de Stafeto). La 21an ni iris al la teatro « De Korrekelder » kie nia membro A. Symoens donis prezentadon de iom novspecaj kantoj. Li akiris grandan sukceson. Poste okazis dua prezentado. La lasta kunveno de novembro estis dediĉata al gramatikaĵoj donitaj de R. Martens kaj ĉeestata de la alia bruga grupo. La 12an de decembro ni memoris Dr. Zamenhof, i.a. legante partojn el la nova jam menciita biografio de M. Boulton. Ĉeestis en agrabla kunesto S-ro Poupeye, prez. de la alia Bruga grupo. La 17an ni estis niavice la invititoj de « Br.G.E. » kie ni aŭdis paroladon kaj vidis diaojn pri vojaĝo al Lugano. La 28an okazis nia tradicia Kristnaskofesto. Post bonega mango ni ĝuis plej variajn scindaĵojn de Gr. Maertens. Poste Simone De Koninck montris memfaritajn diaojn ; ŝi admirigis bildojn de korpoj kaj korpopartoj tiajn kiajn la antikvaj Grekoj estus enviintaj ! La kunveno de la 9a de jan. en kiu la prezidanto konatigis la verketon « Aventuroj de Pioniro » de † Prof. Dr. E. Privat (eldono de Stafeto) iĝis unu de la plej viglaj kunvenoj imageblaj. La diversaj ĉapitroj instigis al viva interŝanĝo de ideoj pri la moralo en politiko, pri la relativeco de heroeco kaj perfideco ktp. ktp. Bedaŭrinde la aŭtoro ne donis pli da detaloj kaj da nomoj. La ĝenerala jarkunveno okazis la 16an kun la kutimaj raportoj kaj reelekto de la estraro. La 23an de jan. ni povis admiri diapozitivojn de Gr. Maertens kaj C. Hendryckx pri difinitaj temoj ; floroj i.a. La 30an ni havis la duan anoncitan debaton, nun pri la problemo kial la esperanto-kursoj ne konas pli da sukceso. Fina konkludo : estas certe malhelpoj ; sed aliflanke ni bezonas modernajn labormanierojn ; kaj recipe, ni devas penetri en difinitajn mediojn kaj tie doni kursojn. Tiam ni povos havi denove iajn sukcesojn.

« de Belgujo » okazis fondigo de Seminario de Esperantistaj Instruistoj. Ĝi okupiĝos pri disvastigo de Esperanto en la lernejoj kaj interŝanĝo de pedagogiaj rimedoj. Ĝi kunvenos ĉiunonate unu sabaton en Lieĝo, 4, Thier de la Fontaine, en Lieĝo. Ĝi funkcios unue sub la aŭspicioj de la tri supre cititaj asocioj kaj poste liberiĝos por memstariĝo. Inter la partoprenantoj al la fondigo, ni rimarkis S-rojn Fays, Inspektoro en la Oficialaj lernejoj ; Prof. Vanbreuse, de la Ateneo de Verviers, Prof. Leroy el Ateneo de Lieĝo, Dron Denoel, Prezidanto de Bel. Esp. Fed. S-ron Koeune, Administr. de Bel. Esp. Fed., S-ron Lemme, Administr. de Bel. Esp. Fed., F-inon Champy, Instruist. ĉe la Benediktaninoj, F-inon Henquinet, Instruist. kaj Administr. de Bel. Esp. Fed., F-inon Collard, Sekr. de Katolika Esp-ista Grupo en Lieĝo kaj Serge Denoel, aktiva propagandisto en la universitataj medioj de Lieĝo. Prof. Touin, Prezidanto de Katolika Esp. Grupo kaj F-inon Godefroid, Prof. en Mezlernejo Hazinelle, kiun oni inaŭguris la saman tagon, sin senkulpigis. F-ino Wolff, Prof. kiu laboras kiel ĉiujare monatojn en Svisujo, estas, kompreneble senkulpigita.

Por 1964, mi preskaŭ certe atingos la centmembran nombron, kiu grupo pli rapide kreskos ? Grupo de Lieĝo estas preta konkursi.

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgiujo) - Tel. (056) 216 54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2 Abdijstr. 57 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9 Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Vote 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2